

# Dulce fit nobis

## Brevier-Himno

Kristnaska tempo > dimanĉon post Kristnasko (aŭ la 30-an de decembro) >  
> Sankta Familio – Jesuo, Maria kaj Jozefo > horo de la legaĵoj

*Dulce fit nobis memorare parvum  
Nazaræ tectum tenuemque cultum;  
expedit Iesu tacitam referre  
carmine vitam.*

*Arte qua Ioseph humili excolendus,  
abdito Iesus iuvenescit ævo,  
seque fabrilis socium laboris  
adicit ultro.*

*Assidet nato pia mater almo,  
assidet sponso bona nupta, felix  
si potest curas relevare lassis  
munere amico.*

*O neque expertes operæ et laboris,  
nec mali ignari, miseros iuvate;  
quotquot implorant columen, benigno  
cernite vultu.*

*Sit tibi, Iesu, decus atque virtus,  
sancta qui vitæ documenta præbes,  
quique cum summo Genitore et almo  
Flamine regnas.*

*Amen.*

latina T: papo Leono la 13-a, † 1903

Ho, kiel ĉarme, pensi pri la simpla  
dom' nazareta, ĝia stil' modesta;  
kiom utile, kanti pri l' kaŝita  
viv' de Jesuo!

Vi, ho Jozefo, kun eduka arto,  
vidas Jesuon iĝi plen-kreskulo,  
faras volonte lin meti-kunulo,  
servas humile.

Pia patrino por la Dia Filo,  
por la fianĉo bona fianĉino,  
por ĉiuj lacaj preta helpantino,  
Vi, ho Maria.

Vi, kiuj konas nian vivo-penon,  
milde rigardu ĉiujn mizerulojn,  
kaj la apogon, kiun ili petas,  
donu bonkore.

Laŭdon al Vi, Jesuo, kaj honoron!  
Sanktan ekzemplon donas Vi de l' vivo.  
Vi kun la Patro kaj la Spir' favora  
regas eterne.

Amen.

E: Albrecht Kronenberger 2008